

NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)

Redaktas:

Jesús Miguel García Iturrioz



Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

Jar-kotizoj: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Junaĝis 30 jaroj): 20 €.
KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550

APRILIO/JUNIO 2020

Nro. 123 (2/20)



FORPASIŝ EDUARDO LARROUY

LOKE ...



La pasintan 27an de aprilo 2020^a mortis en Bilbao nia karega amiko Eduardo Larrouy.

Kion diri pri li? Lia longdaŭra vivo, preskaŭ tiel longa kiel tiu de nia E-rondo, estas plenplena de okazintaĵoj same ligitaj al la historio de Hispanio dum la lastaj 100 jaroj kiel al la historio mem de Esperanto en la regiono kiu ĉirkaŭas Bilbaon.

Kiel eta omaĝo al li, ni ree skribas biografieton publikigitan antaŭ kelkaj jaroj en tiu ĉi revueto kun kelkaj korektoj kaj aldonoj.

Eduardo Larrouy naskiĝis la 9an de marto 1913 en Haro (La Rioja), do ĉi jare li iĝis 107-jaraĝa. Lia patro, enólogo, devenis el franca Vaskujo kaj venis al La Rioja por labori en vinkelo. Ekde tre juna aĝo Eduardo jam interesiĝis pri Esperanto, tiel ke en la jaro 1932 (19-jara) aliĝis al kurso gvidata de la elstara esperantisto Alberto Díaz Chapartegui (patro de Amador Díaz, kiu estis prezidento de Brita E-Asocio).

Laŭ rakontis li mem, la komencoj estis jenaj: ene de amika rondeto, kiu kuniĝis la dimanĉojn por ĉeesti dancejon kaj trinki, laŭ la bilbaoa kutimo, kelkajn glasojn da vino, Eduardo ekparolis pri sia deziro, ke konvenus la ekzisto de komuna lingvo inter la homoj; tiam, unu el la amikoj respondis ke tiu lingvo jam ekzistis: Esperanto. Tiu sama amiko ankaŭ informis lin pri la ekzisto de E-grupo en Bilbao. Tien iris Eduardo, en la strato Iturrubide. “La ejo estis ege malluksa, kun lampglobeto, kiu pendis el la plafono per simpla fadeno”.

Eduardo aliĝis al tiu lernojaro 1932-33 kaj, hazarde, je la fino, estis elektita por legi paĝon de libro (tiama kutimo) kaj ricevis libron subskribita de la instruisto, libro kiu ankoraŭ staras ĉe liaj hejmaj bretoj. La sekvontan lernojaron, li estis jam intruisto kaj en la jaro 1935 eniris la estraron kiel voĉdonanto.

Iom poste alvenis la hispana intercivitana milito (1936-1939). Kun ĝi, tre malhelaj jaroj por la E-movado kaj por la tuta hispana popolo. La armeo de Franco (pr. Franko) eniris Bilbaon en junio 1937; la E-Grupo fermiĝis. Pro timo, la libroj de la biblioteko estis kaŝitaj. Dume, Eduardo partoprenis la militon. Post esti venkitaj en ĝi, Eduardo, kiel aliaj esperantistoj, travivis diversajn malagrablajn spertojn, kiuj sufiĉus por plenigi romanon kaj ankaŭ anekdotojn rilate Esperanton: Li estis kaptita en Santander kaj enkarcerigita en la sportejo de “El Sardinero”; tie li havis la okazon instrui Esperanton al aliaj malliberuloj, konkrete, al 8 el ili.

Post Santander, li estis enkarcerigita en la universitato de Deŭsto (Bilbao) kaj kiam okazis la ribelo en la fortikaĵo “San Cristóbal” (apude de Pamplona) oni veturigis lin al koncentrejo de Miranda de Ebro (Burgos), speciale rezervita por la membroj de la “*internaciaj brigadoj*”; tie, sur koridoro, li aŭskultis paroli Esperanton al du malliberuloj (unu germana, la alia bulgara) kaj alparolis ilin; sed tuj alvenis gardisto, kiu disigis ilin per kriegoj kaj pafilrapoj; Eduardo ne plu vidis ilin.



LOKE ...

De Miranda de Ebro oni veturigis lin al Aranda de Duero (Burgos), Alendralejo, Mérida, Campanario kaj Castuera, kie troviĝis la militfronto. Feliĉe li sukcesis survivi tiujn ege malfacilajn jarojn kaj alveni al nova epoko, en lia vivo kaj en la vivo de la E-Grupo de Bilbao.

Iom post iom la esperanta movado renaskiĝis en Bilbao; je la komenco, ĉar Esperanto ne estis leĝa ene de la diktaturo de Franco, kelkaj esperantistoj komencis kuniĝi por interparoli dum promenis ĉirkaŭ la "Nova Placo" de Bilbao pogrube de ne pli ol tri personoj; en 1957 la E-Grupo povas denove, laŭleĝe malfermi siajn pordojn; tiel ke Eduardo laboris en Madrido kaj revenis al Bilbao nur kelkajn semajnfinojn, li ne povis ĉiutage partopreni la grupan vivon, sed li ne perdis la kontakton kun la esperantistoj de Bilbao.

Post sia emeretiĝo, li povis dediĉi pli da tempo al la Grupo; en la jaro 1979 li estis Prezidanto; sed jam de antaŭe apartenis al diversaj estraroj kaj ankaŭ apartenos poste; ege aktiva li partoprenis en la organizado de la 75-a datreveno de la fondiĝo de la Grupo (1981), kio okazigis kongreseton en Bilbao, kun partopreno de esperantistoj el la tuta Hispanio.

Same, lia laboro estis tre grava por la sukceso de la hispana kongreso de la jaro 1989 kaj de la eŭropa (2004), precipe pro liaj demarŝoj ĉe la aŭtoritatuloj. Dum postaj jaroj li partoprenos preskaŭ ĉiujn kongresojn universalajn kaj hispanajn.

Pace ripozu, Eduardo. Por ĉiam restos en nia memoro viaj optimismo kaj entuziasmo.




De maldekstre dekstren: Toño del Barrio, Eduardo Larrouy, Jesús M. García kaj Paco López, dum vizito de la Prezidanto de HEF al Bilbao (2015).

NI DEVIS HALTIGI NIAN KURSON.

De kiam la hispana registaro dekretis, la 14an de marto, la devigan enhejmiĝon de la loĝantaro pro koronavirusa malsano KOVIM-19, la vivo de ni ĉiuj ege ŝanĝiĝis ĉar, inter aliaj aferoj, la vojaĝeblecoj ege reduktiĝis.

Tial tute ne eblis daŭrigi la elementan kurson, kiu komenciĝis antaŭ nemulte, almenaŭ kun la persona ĉeesto de la gelernantoj. Spite de tiuj malfacilaĵoj, la instruisto, David, ne ĉesis la kontakton kun tiuj estontaj esperantistoj kaj klopodas instrui ilin pere de la reto.



Ni esperu baldaŭ reiri la vojon al la antaŭa normala situacio.


... KAJ NI ANKAŬ NE POVIS OKAZIGI LA DEVIGAN ĜENERALAN KUNVENON.

Tiu aĉa viruso sukcesis ŝanĝigi niajn kutimojn, eĉ nian vivon, kaj ankaŭ aferojn, kiuj ĝis nun ripetiĝis jaron post jaro kaj estis referencoj en nia vivo. Inter ili, la deviga ĉiujara ĝenerala kunveno.

Ni okazigis ĝin kutime ĉirkaŭ la 20-an de majo, naskiĝtago de nia E-Grupo. Sed ĉijare, kompreneble, ni ne povis plenumi tion kaj sekve, ni ne povis aprobi la spezoekonton de la jaro 2019, nek la buĝeton por 2020, nek elekti novan estraron.

Ni pensis ĝin okazigi pere de komputiloj aŭ portebaj telefonoj, profitante la ŝancojn, kiujn malfermas programoj kiel Skajpo, instagramo, guglo-renkontejo kaj similaj. Fine, ni rezignis pro la malfacilaĵoj, kiuj stariĝis antaŭ homoj, kiuj ne bone mastrumas elektronikaĵojn.

Nu, ni esperas okazigi la ĝeneralan kunvenon en oktobro, interalie ĉar la leĝoj devigas nin okazigi ĝin.



NEK ALIAJN E-ARANĜOJN.

Kiel eble vi jam scias aŭ, se ne, certe vi imagas, ĉijare ankaŭ ne okazos anoncitajn E-aranĝojn: la hispanan kongreson en Comillas, la UKon en Montrealo, la IJKon en Nederlando, La Itala Kongreso en Asizo, ktp., ktp.

FORPASIS MIGUEL ALVAREZ VILLOTA.



Don Miguel Álvarez Villota

"Ilustre de Bilbao"

Falleció en Bilbao, el 19 de mayo de 2020, a los 87 años de edad, habiendo recibido los S.S.SS. y la B.A. de S.S.

Su esposa, Esther Egaña; hijos, Mikel y Endika; hijas políticas, Piedad Puente y Pura C. Viedma; nietos, Iraida, Maitane y Endika; nietos políticos; biznietos, Ian, Tyler y demás familia.

Debido a las circunstancias actuales, la despedida se realizará en la intimidad familiar. Agradecemos las muestras mostradas hacia él.

Tanatorio Funebria Basurto. Cuesta Olabeaga, 18. Bilbao. Tfno. 946 611 000

La pasintan 19an de majo forpasis en Bilbao Miguel Álvarez Villota, "Miguelín" aŭ "Miguelón"-pro lia alta staturo-. Antaŭ kelkaj jaroj li estis nomumita "ilustre de Bilbao" pro sia aktivado ene de sociaj organizoj. Iam ankaŭ aktiva esperantisto. Malgraŭ ke, laŭ peto de familiano, li ne plu estis Grup-ano, ni volas iel omaĝi lin.

Miguel en 1971 →





Okaze de deviga enhejmiĝo pro Koronaviruso, estis diversaj iniciatoj por ligi esperantistojn inter si aŭ por stimuli la lernadon de Esperanto pere de retaj komunikiloj. Jen du afiŝoj uzataj de Hispana E-Federacio (HEF) por propagandi nian lingvon kaj altiri homojn al Esperantujo.

AMUZA KURIOZAĴO. Esperanto en politika partio.

Certe ne oftas ke Esperanto aperas en statuto de politika nuna partio, sed mi trovis escepton. Bedaŭrinde, tio ne ŝajnas serioza afero, sed ŝirmilo de aparta homo por vendi siajn librojn pri "La era de Acuario", "Método definitivo y solución para la vida", ... ktp. Sed, jen:

ARTÍCULO 3. LENGUAS

Las organizaciones de base que así lo decidan podrán utilizar, además del castellano, cualquiera de las lenguas oficiales reconocidas por la Constitución Española, cuando opere en el territorio español, o cualquier otro idioma, incluido el esperanto, fuera del territorio del Estado español.

Kaj ĉi tie ĝia retpaĝo: <http://uniddetodoslospueblos.info/>

(Kardo. 13/05/2020)

“La Bambo” en Esperanto.

Spektinda filmeto. La familio Ávila regala nin per versio de La Bambo. Kantis Maria Ávila, akompanis per gitaro Grinoalda Ávila; per guiro, Antero Ávila; kaj per bongoj, Miguel Ávila.

<https://youtu.be/9ho8KQRkFP8>

(María Zocato. 20/04/2020)

EN ESPERANTO EN LA TAGO DE LA LIBRO

Okaze de la Internacia Tago de la Libro, la 23an de aprilo Hispana Esperanto-Federacio rememorigis siajn anojn kaj amikojn ke en nia retejo troviĝas la plena versio en Esperanto de la majstra verko "La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha", libere alirebla en formato epub.

Ni invitas vin ĉiujn elŝuti kaj legi ĝin. Kaj vi povas fari tion kolektive: ni proponas ke vi kunhavigu vian sperton kun la esperantistoj en la mondo. Filmu vin legante pecon de Don Quijote, vian preferatan aŭ iun hazardan. Kelkaj el tiuj legadoj eblas spekti ĉe:

<https://youtu.be/DZLnDkm7VXk>

<https://youtu.be/monxXblwOg0>

(Bitbulteno de HEF. Nro. 66. 24/04/2020)

"BOLETÍN" DE HEF EN LA RETO.

Antaŭ kelkaj semajnoj estis eldonita la numero 429 (januaro-marto 2020), de la bulteno de Hispana Esperanto-Federacio, "Boletín" (memoru ke temas pri la oficiala revuo de HEF). Pro la specialaj cirkonstancoj kiujn trapasas nia lando, la estraro de HEF decidis prokrasti la sendadon de la papera eldono, kaj ni havigis ĝin elektronike al ĉiuj anoj de la asocio uzantaj retroŝton. Se vi mem estas ano kaj ne ricevis ĝin, bv. skribi al la sekretario de la asocio (admin@esperanto.es), por kontroli ĉu ni ne disponas je via retadreso aŭ ĉu ĝi estas erara.

Ĉiuj ekzempleroj de *Boletín* estas libere alireblaj en nia retejo, ekde la numero 1, en nia Bitoteko. Normale, la lastaj kvar numeroj estas alireblaj nur de niaj anoj, en la interna spaco de la retejo, sed ni decidis publikigi malferme ankaŭ tiujn ĉi.

La retejon de HEF vi trovos en <https://www.esperanto.es/hef>.

(La Bitbulteno de HEF. Nro. 66. 24/04/2020)

Forpasis la diplomato Ricardo Díez Hochleitner.



La 1an de aprilo forpasis la pedagogo kaj diplomato Ricardo Díez Hochleitner, honora prezidanto de la institucio nomata Klubo de Romo kaj filo de la esperantisto Félix Díez Mateo, prezidanto de la Esperanto-Klubo de Bilbao kaj ege aktiva esperantisto en tiu urbo dum la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento.

NE FORGESU KE...

HEF planas okazigi la hispanan kongreson en Comillas en oktobro, se la evoluo de la malsano tion permesas. En Kantabrio la situacio estas relative pli bona ol en aliaj hispanaj regionoj, do rezervu la datojn de la 9a ĝis la 12a de oktobro por veturi al beleaga urbo Comillas.

Militaro hejtas la klimaton.

Laŭ esploro i.a. de britaj scienculoj publikigita en Royal Geographical Society la militaro kaŭzas grandan kvanton da CO₂-eligoj. Oni kalkulis ke sole tiu de Usono kaŭzas 5% de la tutmonda eligo, kaj estas pluraj aliaj Paradoksa situacio: la klimata varmiĝo kaŭzas malpacon – sed batali militare akriĝas ĉi-tiun situacion.

(AVE. 11/03/2020. Fonto: www.heise.de/tp/features/Das-US-Militar-einer-der-groessten-Klimasuender-in-der-Welt-4455925.html)


Dezertoj, sablo, mar-bordoj, ktp. - tutmonda minaco.

Vi certe jam legis ke la uzeblaj rezervoj de utiligebla sablo reduktighas pli kaj pli. Ne ĉiu tipo de sablo utilas por specialaj celoj (ekz-e produkti betonon). Konstruado, moderna rompanta nafto-elsuĉado (angle „fracking“), kaj kreado de insuloj (Singapuro, Dubai) bezonas gigantajn kvantojn da sablo.

La sablo de la dunoj de Saharo aŭ sur la tereno de la araba duoninsulo ne taugas pro la faineco. Fosi sablon je la marbordoj je multaj lokoj ne plu eblas, ĉar tie jam mankas sablo, kaj la maro forprenas ĉiujare plurajn metrojn de la bordo. Krome la fosado je la marbordoj detruas biosferon, kaj krome akcelas la perdon de marbordaj terenoj.

Alia tipo de erozio estas la dezertiĝo, kion oni klopodas haltigi diversmaniere; ekz-e plantante arbarojn je la rando de Taklamakan en P.R. Ĉinio. Pri la nova dezert „Aral Kum“ dezerto kie antaŭ 70 jaroj estis la Aral Maro vi povas vidi filmon je la 9a de Junio – informoj pri ĉi-tiu homfarita katastrofo vi povas legi en Esperanto sur nia retejo: verduloj.org/aral.htm La filmoj: ARTE.tv (en pluraj eŭropaj lingvoj) ekzistas pluraj filmoj pri tiuj temoj – simple serĉu „erozio“ kaj „dezerto“ en via lingvo.

(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 30/05/2020)



Ŝipo sur la dezerto de Aral (aŭ Aralkum), la plej juna dezerto en la mondo: ĝi ekaperis en 1960 sur la loko kie antaŭe troviĝis la granda lago nomata Aral Maro, inter Uzbekistano kaj Kazahstano.

Tiu dezerto ŝuldas sian ekziston al la troa uzo de akvo por irigacio dum la epoko de Sovet-Unio.

Esperantumado en la reto.


Inter aliaj iniciatoj, TEJO pretigis videojn kun spertoj tutmondaj pri la pandemio. En aprilo oni eldonis du novajn filmojn, kiujn vi povas spekti per la ligiloj en:

<https://www.tejo.org/esperantistoj-kaj-kronviruso-epizodo-3/>.



Kiel nomi tiun viruson?

Tiu viruso estas la sola afero pri kiu ni ĉiuj parolas kaj pensas de semajnoj.



Sed kiel ni nomu ĝin en Esperanto? La medicinistoj preferas la terminon *koronaviruso*, ĉar tio estas ĝia internacia teknika nomo, uzata en multaj lingvoj kun la sama formo (tamen laŭ la aparta skribsistemo de la koncerna lingvo). Fakte ekzistas multaj specoj de viruso, ekzemple *enteroviruso*, *rinoviruso*, *rotaviruso* kaj aliaj. La viruso, kiu nun kaŭzas la tutmondan epidemion, apartenas al la familio de la


koronavirusoj, sed ekzistas multaj aliaj specoj de koronaviruso, kiuj povas kaŭzi ankaŭ nur simplan malvarmumon.

Se vi volas uzi tiun teknikan terminon, notu, ke *koronaviruso* estas unu vorto. La unua parto *korona-* aspektas kiel adjektivo, sed fakte ĝi estas parto de la radiko. La vorto estas nedividebla.

Intertempe, tamen, la esperantistoj, kiuj plejparte ne estas medicinistoj, diskutas kiel nomi tiun viruson en Esperanto. *Corona* estas la latina vorto por "krono" (la kapvesto portata de reĝo aŭ reĝino), do multaj esperantistoj nomas ĝin *kron-viruso*.



En Esperanto ekzistas ankaŭ la vorto *korono*. Ĝi rilatas al la ekstera parto de la



atmosfero, kiu ĉirkaŭas la sunon, kvankam normale eblas vidi ĝin nur dum eklipso. Fakte ankaŭ tiu vorto *korono* venas de la sama latina vorto *corona*, ĉar ĝi ĉirkaŭas la sunon kiel krono. En pluraj eŭropaj lingvoj "krono" kaj "korono" estas la sama vorto, ekzemple en la itala, hispana, franca, pola kaj

aliaj.

La membroj de la Akademio de Esperanto diskutis, kiel nomi tiun viruson en Esperanto. La plejmulto estis egale dividita inter *kron-viruso* kaj *koron-viruso*. (La malgranda grupo de medicinistoj, aliflanke, preferis la teknikan terminon *koronaviruso*.) Finfine, do, la Akademio ne rekomendis unu el la du formoj, sed anoncis, ke ambaŭ estas uzablaj. Nur post iom da tempo ni ekscios, kiu el la du formoj estas preferata de la plejmulto de la esperantistoj.

Ofte okazas, precipe rilate al sciencaj aferoj, ke por la sama afero ekzistas popola nomo kaj scienca nomo, ekzemple salo nomiĝas ankaŭ *natria klorido* (NaCl), kaj la floreto miozoto nomiĝas ankaŭ *neforĝesumino* (ne-forĝesu-min-o).



Ankaŭ tiu viruso, pri kiu oni nuntempe paroladas en ĉiu gazeto, ricevas sian popol-nomon en Esperanto, eĉ se ni ankoraŭ ne decidigis inter la du formoj. Kiam la krizo finiĝos, kaj ni ĉiuj rajtos reiri al nia normala vivo, ni ne plu bezonos tiun vorton, kiu rilatas al nuntempa aktualaĵo. Tiam la sciencistoj denove povos paroli inter si pri la *koronaviruso*, uzante sian preferatan terminon.

(Anna Löwenstein. 12/04/2020. Prenita el la reto)

ATENTU! Ek de tiu-ĉi jaro, al tiuj membroj de la E-Grupo, kies retadreson ni havas, ni sendos "Nia Ponto"-n nur elektronike (PDF). Se iu el vi deziras plu ricevi ĝin papere, skribu al la retadreso de la Grupo: esperantobi@gmail.com. Tiuj, kies retadreson ni ne havas, ricevos ĝin per normala helika poŝto.

Tiu ĉi numero, pro la nuna pandemio, estas sendata nur elektronike.